

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

2a KONKURSO PRI PENTRADO POR DULINGVAJ VERKOJ

PREMIO "LILIANA CERNECCA SORANZO" - JARO 2015

Regularo

Art. 1

Partopreno estas senpaga.

Je libera temo, la konkurso akceptas kiun ajn teknikon, inkluzive de glulaboraĵoj, mozaiko kaj perkomputila grafiko.

Ĉiu verko devas enteni - sur la surfaco pentrita - tekston de almenaŭ unu vorto: en esperanto (skribita en verda koloro) kaj en unu el la lingvoj de Eŭropa Unio (skribita en alia ajna koloro).

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per nur unu ellaboraĵo kun maksimumaj dimensioj: 80x80 cm, inkluzive de la eventuala kadro. La perkomputilan grafikaĵon oni prezentu en printita formo, en dimensio maksimuma kiel menciite, kun aldonita dosiero por ebla uzo laŭ art. 4.

Art. 2

Sur la verka malantaŭo devas aperi la aŭtoraj datumoj kaj la titolo, en kiu ajn lingvo. Krome, la pentraĵo estu provizita per taŭgaj iloj por simpla alkrado surmura.

Art. 3

La Art-Komisiono, alcele elektita, distribuos la jenajn premiojn:

1-a premio - € 450

2-a premio - € 250

3-a premio - € 150

Speciala premio por geknaboj ĝis 14 jaroj: € 100.

Ĉiu partoprenanto ricevos de Triesta Esperanto-Asocio partopren-diplomon.

Art. 4

Triesta Esperanto-Asocio retenos la premiitajn verkojn kaj havos pri ili plenan reproduktorajton.

Art. 5

Enskribiĝo kaj transdono de la pentraĵo okazos - **en 2015** - ĉe la sidejo de TEA (via del Coroneo 15, 34133 Trieste - 3a etaĝo) en la vendredaj tagoj, ekde la 19a horo ĝis la 20h30, de la aprila, maja, junia, septembra monatoj, aŭ oni sendu ĝin poŝte. La verkoj devas atingi TEA-n ĝis maksimume la 16a de oktobro.

Art. 6

La ekspozicio de la konkursontaj verkoj okazos ĉe la TEA-sidejo, aŭ en aliaj ejoj ankoraŭ difinendaj, en **novembro 2015**.

Art. 7

La premio-disdonado okazos la **5an de decembro 2015 je la 17a horo**, ĉe la TEA-sidejo.

Art. 8

La nepremiitajn verkojn oni povos preni fine de la premia ceremonio aŭ dum la **vendredoj de januaro 2016**, ekde la 19a horo ĝis la 20h30.

Se ĝis la fino de januaro 2016 oni ne kunprenis sian pentraĵon, tiu iĝos posedaĵo de TEA, kune kun ties reproduktorajto.

Art. 9

La juĝo de la Art-komisiono estas neapelaciebla kaj nekontestebla.

La Organiza Komitato, kvankam garantiante ordinaran gardadon de la transdonitaj verkoj, tamen ne respondecas pri ŝteloj kaj/aŭ domaĝoj eventuale okazontaj.

La partopreno en la konkurso antaŭvidas la senrezervajn konon kaj akcepton de la regularo, plus la plenigadon de la enskribiĝilo.

Art. 10

Konforme al la leĝo n. 196/03 pri gardado de personaj donitaĵoj, oni certigas, ke ĉiujn ricevitajn datenojn oni prikonsideros per la pleja diskreteco kaj, en ĉiu momento, la aŭtoro rajtos peti ilian ĝisdatigon, kontrolon aŭ forviŝon.

Art. 11

La Asocio tenas por si la rajton, akcepti aŭ malakcepti la partoprenon de la prezentotaj konkursaĵoj.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA

Telefono 331-4805706

E-mail: esperantotrieste@yahoo.it, nored@tiscali.it,

testudo.ts@gmail.com

<http://www.tea1906.altervista.org>

Oni atentigas, ke facile troveblas, interrete, vortaroj pri Esperanto, ekzemple ĉe:

<http://hvortaro.altervista.org/>

http://www.lexicool.com/dictionaries_esperanto.asp?IL=2